

# MOVIMENTON!



## venonta haltejo,
# KATHMANDU:
## Tra la mondo pere de PASPORTA SERVO

AŬTUNO 2003

brazila esperantista junulara organizo BEJO



**SUPRE** | BAHAI TEMPLE, DELHI, BARATO (HINDA UNIO)

# MOMENTON!

**#02 AŬTUNO 2003** | OUTONO 2003

Saluton, gesamideanoj!


Mi havas nenion (tre gravan) por diri al vi, nur tion ke mi superdankas al geamikoj, kiuj helpas min. Dankon al vi ĉiuj! Sen vi la revuo ne estus preta kaj tiel bone akceptita.

Mi volas diri al vi, karaj gelegantoj, ke mi volas ricevi viajn opiniojn pri la revuo. Sendu al mi artikolojn! Vi ne devas timi, ke via artikolo ne estas sufiĉe bona por aperi en bulteno. Ankaŭ ni ne estas profesiuloj pri jurnalismo. Pro tio mi kalkulas je la kompreno de nia legantaro, pensu pri tio!

Pretigu vin por la Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK) en Belo Horizonte/MG. Ĝi estas n-e-m-a-l-t-r-a-f-i-n-d-a!

Mi sopiras vin... Kisojn,

*Grazi.*



**REDAKTORO** | Graziely Fagundes, Pato Branco, Paraná
**ARTO** | Rogério Borges Grilo, Barcelona, Hispanio
**TEKSTO** | Ísis Okabe Piton, Campinas, São Paulo
**REVIZIADO** | James R. Piton, Campinas, São Paulo
**DISTRIBUADO** | BEJO, fondita en 1967 (Landa Sekcio de TEJO ekde 1968).
Caixa Postal 1097 13001-970 Campinas, SP BRAZILO

MOMENTON > Kvarmonata revuo de BEJO. **momenton@esperanto.zzn.com**

# BEJO >>>
## LETERO AL LA MEMBROJ

Ĉiu scias, ke la vivo de junulo estas streĉa pro multa lernado kaj eĉ pli da tempo postulas fakultato. Krom tio, multaj el ni samtempe laboras, do kiel trovi tempon por amuziĝi, por lerni kaj labori por esperanto?

Nuntempe la plej aktiva diskutlisto (BEJO-listo) estas malvigla. Ĉu tiu silento signifas, ke gejunuloj ne plu movadas? Cu ili kabeis? Ne! Ili daŭras laborante en siaj respektivaj urboj kaj grupoj.

Tion mi konstatis en la Renkontiĝo de Sudparaiba Valo en Karagŭatatubo. Tie mi renkontis kelkajn gejunulojn. Ni parolis pri la aliaj kiuj ne venis kaj pri la movado en iliaj urboj. Ĉiuj plendis pro manko da tempo, sed ĉiuj parolis pri siaj faroj en Esperantujo: unuj instruas, aliaj lernas, faras esperantan hejmpaĝon en interreto por asocio, alia laboras en esperanta lernejo ktp... Inter ni preskaŭ ĉiuj partoprenos la nemaltrafindan venontan Brazila Kongreso de Esperanto.

BEJO do daŭrigas sian laboron. En marto estis lanĉita de BEJO la hejmpaĝo BEJO-Galerio, vizitebla ĉe:

**www.bejogalerio.kit.net**


Temas pri paĝaro kun fotoj kaj informoj de partoprenantoj de BEJO-listo. Alia novaĵo temas pri la ĉefa paĝo de BEJO, en kiu oni ankoraŭ faras kelkajn ŝanĝojn:

**www.bejoesperanto.kit.net**

En la ĉefa paĝo oni trovas informojn pri esperanto, E-movado, pri BEJO, fotojn de la kongresejo kaj informojn pri BEJK 2003, Pasporta Servo, kaj pri nia revueto Momenton!

Ĉiuj jam ricevis la novan numeron de "Momenton!", tre

**REDAKTIS** | ISIS CLIMANY OKABE PITON, BEJO- SEKRETARIO
**DEKSTRE** | HEJMPAĜO DE BEJO




bela danke al la grafika aranĝo de Rogério Borges Grilo (pli konata kiel DJ Roger) kaj nia nova redaktorino Graziele Fagundes. Oni povas diri, ke "Momenton!" estas promociita de bulteno al revuo.

En Esperantujo ĉiam aperas novaj talentoj. Ni petas ĉiujn, kiuj dum 23 BEJK volas prelegi, kanti, ŝatos deklami poeziaĵojn, teatrumi, danci, instrui ludojn ktp: skribu al bejoesperanto@yahoo.com.br aŭ sendu leteron al BEJO - Caixa Postal 1097 – Campinas (SP) - 13001-970. Ĉiuj, kiuj pretigas la aranĝojn kaj sin prezentos ne estas profesiuloj, sed volontulaj aktivuloj. Danke al ili niaj kongresoj iĝas interesaj kaj amuzaj.



# MIA TAGLIBRO >>>
## ANKAŬ HODIAŬ MI REVAS

Hodiaŭ mi sentas min kvazaŭ mi estus en dekreto de la registaro: en gardata libereco. Modernaj gepatroj estas tiaj. Teorie, ĉio en ordo, liberalaj, komprenemaj eĉ toleremaj! Sed en la praktiko ili timegas kaj sentas sin maltrankvilaj, streĉitaj, rodantaj la ungojn, observantaj ĉion kion ni, gefiloj, faras. Kaj kion ni faras? NENION! Pli bone, nenion pli gravan. Sed ili ne malstreĉiĝas! Ili vibras por ke la libereco sukcesu!

Ankaŭ hodiaŭ mi revas! Eble estas la vetero, pli agrabla...mankas tio, kion fari... kaj mi restas tie ĉi, revanta, ke mi kreskos kaj eniros en fakultaton... studos... diplomiĝos... serĉos laboron... serĉos... serĉos...

Forgesu!

Pli bone revi pri tre bela knabo! Belega, ĉarma, tre karesema, tre gustuminda, fidela... fidela... unuvirina... tiel kiel...tiel kiel... tiu... eh...la...kiel la...nu...Forgesu!

Pli bone revi pri Brazilo kiu solvas siajn problemojn, finas la koruptadon, la perforton, mizeron, malsaton, malsanon, la problemon de la teroj, maldungon, la inflacion, la detruon de la arbaro...uff!

Ververe!

Estas tagoj kiam revoj ne valoras. Ili ŝajnas reala vivo!



**VERKIS** | MIGUEL PAIVA
**ESPERANTIGIS** | ISIS OKABE PITON



# GE-LEDON > OMAĜO DE BEJO

**EN LA TAGO 03/03/03** BEJO perdis du tre gravajn anojn: Symilde kaj Gilbert Ledon. Ili ambaŭ delonge aliĝis kaj realiĝis al BEJO kiel Bonfarantoj (la plej alta kotizo de BEJO).

Ili ĉiam agnoskis la gravecon pretigi la novajn generaciojn por transpreni respondecon en la movado. Symilde ĉiam favoris la okaziĝon de BEJK ene de BKE por integrigi nin ĉiujn. Gilbert estis la kutima bonhumorulo, kun juna koro, kiu postkuris la krokodiladon. Ĉiuj multe lernis kaj ridis ĉe li!

**Niaj omaĝaj pensoj iru al ili.**

"tiel estas tiu sed neniam

Amiko mia citis libron, kiu komparas la vivon kun trajnvojaĝo. Tiu komparo estas tre interesa, kiam bone interpretata.

Fakte, la vivo ne estas pli ol trajna vojaĝo. Ĝi estas plena de entrajniĝoj kaj eltrajniĝoj, de kelkaj akcidentoj, de agrablaj suprizoj dum kelkaj envenoj kaj grandaj malĝojoj dum aliaj.

Kiam ni naskiĝas, ni eniras en tiun trajnon kaj troviĝas inter kelkaj homoj, kiujn oni taksas kiel ĉiamajn kunvojaĝantojn: niaj gepatroj.

Malfeliĉe, tio ne estas vera; en iu stacio ili malsupreniros kaj lasos nin orfaj je ilia kareso, amikeco kaj neanstataŭigebla kunesto.

Sed tio ne malpermesas, ke, dum la vojaĝo, interesaj homoj, kiuj fariĝos superspecialaj al ni, envenu. Alvenas niaj gefratoj, geamikoj kaj mirindaj geamantoj.

Multaj entrajniĝas simple pro plezuro, aliaj trovos dum tiu vojaĝo nur malĝojojn. Kelkaj aliaj rondiros la trajnon, pretaj je helpo al bezonantoj.

Multaj malsupreniras kaj lasas eternajn resopirojn. Aliaj nur pretere pasas, tiel ke la libera loko estos nur apenaŭ rimarkata.

Kurioze estas konstati ke kelkaj pasaĝeroj, kiuj estas tre karaj al ni, sidas en apartaj vagonoj, malsamaj al la nia. Do, ni estas devigataj fari la vojaĝon foreste de ili. Tamen, kompreneble, tio ne malhelpas, ke oni, dum la vojaĝo, trairu, kun granda malfacileco tra nia vagono kaj alvenu al ilia... Sed, ne malofte, oni ne povas sidi ĉe ili, ĉar aliuloj jam okupas ilian apudan lokon.

Tute ne gravas, tia estas tiu vojaĝo, plena de batpuŝoj, de revoj, de fantazioj, de atendoj, de ĝisoj...

Sed, neniam, revenoj.

Ni faru nian vojaĝon, do, laŭ la plej bona kaj ebla maniero, klopodante al amplena rilato kun la aliaj pasaĝeroj.

Ni serĉu, en ĉiu el ili, iliajn plej bonajn ecojn. Ni memoru ĉiam, ke, iam, dum la vojo, ili povos malfortiĝi kaj eble ni bezonos kompreni tion.

La granda mistero, finfine, estas ke neniam ni scios en kiun stacion ni malsupreniros, des malpli pri niaj kunuloj, eĉ ne pri nia apuda karulo.

Mi restas pensanta, kiam mi malsupreniros la trajnon, ĉu mi resopiros... Mi pensas, ke jes.

Apartiĝi el miaj geamikoj, kiujn mi dume faris, estos minimume dolorige. Lasi, ke miaj gefiloj forvojaĝu solaj, certe estas tre malĝojige.

## vojaĝo, plena de **revoj, revenoj**"

Tamen mi forte esperos ke, iam, mi estos en la ĉefstacio kaj mi havos grandan emocion vidante ilin alveni portantaj la pakaĵojn, kun kiuj ili ne ekveturis. Kaj kio pleje feliciĝos al mi estos pensi, ke mi funde kunlaboris por ke tiuj akiroj kreskis kaj iĝis valoraj.

Ridmienaj amikoj, ni faru, ke nia ĉeesto en tiu trajno estu trankvila. Ke ĝi valoru la penon. Kaj, kiam alvenos la horo por eltrajniĝi, ke nia libera loko estu sopire sentata, plena je fruktodonaj rememoraĵoj, fare de tiuj, kiuj plu vojaĝas.

**ĈIPAĜE|** "TRAJNO DE LA VIVO" (2003). AŬTORINO: SILVANA DUBOC. ESPERANTIGIS: ADONIS SALIBA.

# JUNULARA MOVADO >>>
## LA VORTO DE LA PREZIDANTO

Ni intervjuis Cassius Deconsi, 21 jara, el Pato Branco (PR), la aktuala prezidanto de BEJO.

***Momenton:*** Kion ni povas esperi el tiuj du venontaj jaroj en la Brazila Juna Movado?

***Cassius:*** Tiuj venontaj jaroj estos ŝanĝaj jaroj! Nia projekto estas igi la junularan movadon la plej forta esperanta movado en Brazilo.

***M:*** Laŭŝajne, lastatempe la junulara movado kreskiĝis en Brazilo, eble instigata de la lastjara IJK, cu vi kredas, ke tio vere okazas, aŭ estas nur nedaŭra okazaĵo?

***C:*** La junularo nur bezonas impulsojn kaj IJK estis ĝuste tiu impulso kiun ni bezonis, mi ne kredas ke tio estos nedaŭra. Unu el niaj proponoj por la nova estraro estas la "reto de reprezentantoj", kiu jam agas por ebligi al ni, havi pli da videbleco de la movado, de la kreskado kaj de aliaj aferoj.

***M:*** Kia estis via sperto en la IJK 2002, kie vi aktive partoprenis?

***C:*** La IJK 2002 estis mia unua internacia kongreso kaj mi ankoraŭ estas kore tuŝata. Estis mirindaĵo, vidi gejunulojn el ĉiuj lokoj de la mondo kune parolantaj, konstati la neekziston de baroj, "esti gefratoj". Kvankam mi loĝas en Brazilio, en ĉi tiu IJK mi estis envolvita en ĉio.

***M:*** Kio mankas al la Brazila Juna Esperantista Movado por plifortiĝi kaj firmiĝi?

***C:*** Ne estas fakte "mankanta io". Eble ni bezonas iom da kuraĝo... La mondo lastatempe estas tiom "malsupra" ke, ni bezonas "suprulojn" kiuj kuraĝas sanĝi ĝin, kaj estas ĝuste tiu kuraĝo "meti la vizaĝon al batado" kiun ni bezonas.

**RAPORTIS** | ROGENER PAVINSK (RIBEIRAO PRETO/SP)

# LAŬTA >
## BRAZILIO, DF

Jimes Milanez, dum sia prezentado en BKE 2001.

**"Idealistoj neniam maljuniĝos"**



# SOŬLA >
## SAO PAŬLO, SP


Tiago Benita muzikas ritmenbluse kaj hiphope, sed kun brazila spico. Dum li laboras por fini sian diskon ĉe diskeldonejo Suda Kruco, li liveris demo-version de "Ne Plu", la unua plenrajta soŭlo en Esperanto. Sekvu: *gxangalo.com/ sudakruco*




# HIPNOTA >
## JAIPUR, RAJASTAN

Viro ludas per sia serpento en strato de Jaipur, "La Rozkolora Urbo". En Rajastan vivis la Maharaĝoj en siaj revaj palacoj.




बहाई धर्म
ईश्वर और उसके अवतारों की एकता को स्वीकार करता है
सत्य के स्वतंत्र अनुसंधान के सिद्धान्त का समर्थन करता है
सभी प्रकार के अंधविश्वासों और पूर्वाग्रहों की निंदा करता है
शिक्षा देता है कि धर्म का आधारभूत उद्देश्य है
प्रेम का वातावरण और समन्वय स्थापित करना
धर्म और विज्ञान को कंधे से कंधा मिला कर चलने की
सलाह देता है
यह मानता है कि धर्म शांतिपूर्ण और प्रगतिशील
समाज का एक मात्र आधार है
स्त्री और पुरुष के लिये समान अवसर और समान
अधिकारों के सिद्धान्त का समर्थन करता है
अत्यधिक गरीबी और अत्यधिक धनाढ्यता दोनों
ही स्थितियों को समाप्त करना चाहता है
अनिवार्य शिक्षा की सिफारिश करता है
सेवा भाव से किये गये काम को ईश्वर की
आराधना मानता है
एक सहायक अंतर्राष्ट्रीय भाषा की सिफारिश
आग्रह करता है

# बहाई उपासना मन्दिर



**LA BAHAA KREDO** (Bahaismo) rekonas la unuecon de Dio kaj de Liaj profetoj, gardas la principon de serĉo por la vero, komdamnas ĉiujn formojn de superstiĉo kaj antaŭjuĝo, instruas ke la ĉefa celo de religio estas promocii konkordon kaj harmonion, ke ĝi devas iri mane-en-mane kun la scienco, kaj ke tio konsistigas la solan kaj finan bazon por paca, orda kaj progresema societo. BAHAI-fido kalkulas je la principo de ekvala oportunoj, rajtoj kaj privilegioj por ambaŭ seksoj, pledas por deviga edukado, nuligas ekstremajn kondiĉojn de riĉeco kaj malriĉeco, valorigas religian laboron faritan kiel diservo anstataŭ blinda adorado, **rekomendas la adopton de unu helpa internacia lingvo**, kaj provizas la necesajn agentojn por fondo kaj la gardo de vere konstanta kaj universala paco.

**SUPRE |** PREĜEJO "BAHAI-DOMO" (TEMPLO DE LA LOTUSO), NOVA DELIO, HINDA UNIO. LOKO DE PREĜO KAJ MEDITO POR HOMOJ DE ĈIUJ RELIGIOJ KAJ RASOJ.
**MALDEKSTRE |** SKRIBAĴO SUR ŜTONO PRI BAHAISMO, EN LA HINDA LINGVO.

# SKOLTISMO > ĈIAM PRETA

Robert Stephenson Smith Baden Powell, la fondinto de skoltismo, naskiĝis en Londono, Anglio, la 22-an de Februaro, 1857. Li skribis en la komenco de la XX-a jarcento la manlibron "Skoltado por Knaboj" laŭ invito de kelkaj britaj junularaj organizoj. En tiu libro, en la paĝo 202 de la unua originala angla versio, li asertas:

"Se vi deziras uzi sekretan lingvon por via patrolo, vi devos eklerni Esperanton. Ĝi ne estas malfacila, kaj oni instruas en libreto tre malmultekosta, ĉirkaŭ unu penco. Ĉi tiu lingvo estas uzata en ĉiuj landoj de la mondo, tiel vi povos uzi ĝin nun ankaŭ eksterlande."

Skolta Esperanto-Ligo estis fondita en 1918. Ĝi estis la unua Internacia Skolta Organizo, post la apero de broŝuro de Alexander William Thompson, kiu proponis ĝin.

Dum kunveno en Luksemburgo, en la jaro 1964, Komitato pri Internacia Skoltado deklaris, ke Esperanto sukcesis pruvi siajn plurajn eblecojn en diversaj medioj kaj kampoj. En kelkaj naciaj skoltaj asocioj jam eblas specialistiĝi kiel interpretisto de Esperanto.

SEL daŭre okazigis siajn proprajn internaciajn tendumadojn kaj seminariojn. Por la venonta Monda Ĵamboreo, SEL starigos budon por propagandi sian Ligon kaj Esperanton. Nuntempe jam estas 26 naciaj reprezentantoj el diversaj landoj.

Brazila Reprezentanto de Skolta Esperanto-Ligo:
Eluízio Rodrigues
Rua Horácio Camargo, 120
Sorocaba/SP

+55 (14) 1804-8105
eluiziobueno@bol.com.br

**SUPRE |** KONTRIBUAĴO SENDITA DE JOZEFO PACHECO (PORTO ALEGRE)
**DEKSTRE |** BADEN POWELL, LA FONDINTO DE SKOLTISMO



# SKOLTA PRINCIPARO

**Skolto havas unusolan parolon**; ties honoro estas pli grava ol sia propra vivo.

**Skolto estas fidela.**

**Skolto estas ĉiam preta** por helpi la proksimulon, kaj ĉiutage praktikas bonan agon.

**Skolto estas amiko de ĉiuj** kaj frato de la ceteraj skoltoj.

**Skolto estas ĝentila.**

**Skolto estas bonkora** por la bestoj kaj la plantoj.

**Skolto estas obeema** kaj disciplina.


**Skolto estas gaja** kaj ridas antaŭ malfacilaĵoj.

**Skolto estas ŝparema** kaj respektas aliulajn posedaĵojn.

Skolto estas pura **je korpo kaj animo.**

**LIGOJ** | POR PLIAJ INFORMOJ, VIZITU LA PAĜOJN: HTTP://ESPERANTO.ORG/INTERNACIA/SKOLTA/PTBADEN.HTML HTTP://TTT.ESPERANTO.ORG/SKOLTA/SM.HTML · ESTAS ANKAŬ DISKUTLISTOJ: SKOLTA ESPERANTO-LIGO HTTP://GROUPS.YAHOO.COM/GROUP/SKOLTA-ESPERANTO-LIGO

# PASPORTA SERVO >>>
## LA VERO ESTAS TIE FOR



Pasporta Servo estas elstara servo de la Esperanto-movado por Esperanto-parolantoj. Ĝiaj membroj havas la eblon ricevi senpagan gastadon - ĉiu kiu posedas propran ekzempleron de la adreslibro de gastigantoj estas membro kaj rajtas uzi sian adreslibron por trovi gastigadon. La adreslibro estas eldonaĵo de TEJO, kaj la reto enhavas pli ol 1000 gastigantoj el 80 landoj.

**SUPRE** | ROGER BORGES KAJ KABINDRA SHAKYA, DURBAR-PLACO
**DEKSTRE** | SANKTEGA TEMPLO EN PATAN (LALITPUR), NEPALO



# LA UNUA IDEO

**LA UNUA IDEO** pri la tiel nomata "Programo Pasporto" estiĝis en 1966, de Ruben Feldman-Gonzales el Argentino. Pasporta Servo laŭ la nuna sistemo aperis unuafoje en 1974, kun 39 gastigantoj, sub gvido de Jeanne-Marie Cash el Francio. Ambaŭ pioniroj daŭre estas gastigantoj hodiaŭ...

Mi jam de multaj jaroj aŭdis pri Pasporta Servo. Kiel por multaj komencantoj, la ideo vojaĝi tra la mondo pere de Esperanto donis emon al la studado; sed nur kvar jarojn post mia unua kontakto kun la lingvo mi kuraĝis aliĝi al la servo.

Oni fariĝas gastiganto se oni plenigas kaj forsendas aliĝilon antaŭ la unuan de Novembro. Kondiĉo estas, ke oni devas scii Esperanton. Ĉiu, kiu mem aperas en la adreslibro kiel gastiganto ricevas propran ekzempleron senpage, kaj tiel fariĝas membro.


Gastigado laŭ Pasporta Servo ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de surplanka dormosako ĝis la rajto je utiligo de tuta domo. Sed mi forte rekomendas la servon, se vi volas pagi neniom por loĝado, trovi novajn kaj interesajn homojn kaj viziti lokojn, kiujn nur la popolo de la lando konas.

Tuj post mia aliĝo, mi ricevis peton de rusa samideano kiu estis vizitonta Barcelonon, la urbo en kiu mi vivas. Li venis pere de entreprena programo kaj restis en hotelo, sed ni trovis horon por promeni tra la urbo, tagmanĝi kaj babili. Dum la manĝado, ni parolis pri multaj aferoj en Esperantujo, kaj li instigis min vojaĝi eksterlande. Du tagojn poste, mi malfermis mian novan adreslibron kaj aranĝis grandan aventuron.

Mi aĉetis flugbileton de Hispanio al Nova Delio, kie mi havas amikinon. **DEK HOROJN EN AVIADILO, KAJ MI ALVENIS** al la flughaveno Indira Gandhi, mia unua fojo en Azio. Mi legas: fakte, "Barato" estas la propra nomo de tiu ĉi lando, komuna al pluraj hindaj lingvoj. Hinda Unio, jen mi...




**ĈIPAĜE | KUN TIMUR LAK, EL RUSIO. LA BILDO ESTIS FARITA ANTAŬ LA LERNEJO DE ARKITEKTURO DE BARCELONO, EN HISPANIO, KAJ EN LA KATALUNA LINGVO ONI LEGAS: "POR LA PACO, HALTIGU NI LA MILITON"**




Delio estas la koro de Hinda Unio, vere energia ĉefurbo, centro de la povo, kaj frukto de miloj da jaroj de historio. La plej bonaj muzeoj de la lando, entreprenoj kaj famaj artistoj estas ĉiuj en Delio. Ĉiuj Ŝtatoj de la lando havas almenaŭ unu butikon tie ĉi, do eblas aĉeti ĉion, kio ekzistas en la lando, kiel manfaritaĵoj, teksaĵoj aŭ juvelaĵoj de specifa regiono. Mi manĝis tre multe, por tre malmulte. Kaj certe tro spice!

Trajne, mi vojaĝis tra la subkontinento ĝis la Taj Mahal, vizitante ankaŭ la ŝtaton de Rajastan. Post multaj tagoj, mi finfine forflugis al la lando de la Himalajoj.


En Nepalo, mi renkontis mian amikon Kabindra de Pasporta Servo, kiu zorgis pri mia loĝado. Mi restis dome en Patan, belega urbeto kun multaj sanktaj temploj.

**SUPRE** | TEMPLO BHAIRAB, KUN LA ESTRARO DE NESPA. "NAMASTE! = SALUTON!"
**DEKSTRE** | KREMACIA RITUALO APUD SANKTA RIVERO , PASHUPATINAH, NEPALO




La plej interesaj kulturejoj de Nepalo situas en la Valo de Kathamandu, kiu inkluzivas sep mondheredaĵajn lokojn. La plej grava nomiĝas "Hanuman-Dhoka Durbar Skvaro". Temas pri vasta komplekso kun mirindaj temploj kaj preĝejoj, ambaŭ Hinduismaj kaj Budaismaj, konstruitaj laŭ la pagoda stilo. Tiu placo difinas la religian kaj kulturan vivmanieron de la popolo, kaj estas la publika loko en kiu la reĝoj de Nepalo estas kronataj.

Kaze de via ĉesto en Kathamandu, iru ĝis Thamel Chowk kaj vi trovos administrejon de NESPA. S-ro Narendra Bhattarai, Vic-Prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio, kaj S-ro Posh Subedi (la kasisto), bonvole promenigis min ĝis la tria urbo de la Valo, Bhaktapur. La vilaĝo estas konata pro siaj artoj, festivaloj kaj dancoj. Tie, la hinduoj kaj la budaistoj kunvivas harmonie, kaj troviĝas kvinetaĝa pagodo dediĉita al Brahma (dio de konstruo), Vishnu (dio de protekto) kaj Shiva (dio de detruo). Kion pli povas mi diri pri la utilo de Pasporta Servo?



# <<< TAĴ MAHAL


## AMO ETERNA



Oni konsideras la maŭzoleon "Taĵ Mahal", situanta en Agra (Hinda Unio), unu el la plej belaj konstruaĵoj en la tuta mondo. La imperiestro Sha-Jahan estis la genia konstruinto de tiu monumento (1643), dediĉita je la amo al lia edzino, Muntaz Mahal. Ŝi estis juna, belega kaj ege inteligenta. Kiel imperiestrino, ŝi riveliĝis bonega konsilanto de sia edzo en la Ŝtataj aferoj. Pro ŝia karitato, ŝi fariĝis amata de la popolo, sed subita morto forprenis la preferatan de Sha-Jahan. Malĝojo kaj maldolĉaj larmoj plenigis do la vivon de la imperiestro, kaj en nur tri monatoj, laŭdire, lia nigra barbo blankiĝis! Li lasis por ĉiam la reĝajn vestojn kaj neniam plu revenis el funebro. Li ordonis konstruadon de tombo por lia amata edzino: "Ke ĝi ne estu funebra, ĉar ĝi devos celebri la mallongan vivon de amo. Ĝia beleco kaj gracio devos eterne memorigi mian edzinon, neniam maljuniĝontan. Taĵ Mahal estos sonĝo marmora konstruita sur la delikata bordo inter realo kaj fantazio, same kiel la pasio".

**MALDEKSTRE |** LA MAŬZOLEO "TAJ MAHAL" EN AGRA, HINDA UNIO

## ĝis revido | até a próxima



**BILDO** | MONTO "EVERESTO". KONKERITA DE MOMENTON EN 2003